

TESTO 45

Ekzerco 1. Kompletigu la vortspacon.

1. Granda **d _ t _** kaj oro, sed mankas la koro.
2. La propono **_ _ c _ nz _** tiun ĉi broŝuron estis por mi surprizo tre agraba – lingvistika priskribo de Esperanto estas unu el miaj plej fortaj interesoj.
3. Usona ministrino pri eksterlandaj aferoj, pro protestoj, **m _ d _ f _ _** la karakterizan terminologion, nun ŝi ne plu parolas pri kanajloŝtatoj, sed pri problemŝtatoj.
4. La pola estas tre dolĉesona lingvo, sed ĝia **_ _ mp _ _ k _** gramatiko mirigus parolantojn de lingvoj kiel la ĉina kaj taja!
5. En kelkaj landoj oni ŝtonumante **_ _ z _ k _ t _ _** virinojn pro nefideleco, kaj publike senkapigas samseksemulojn; en aliaj samseksemulo povas esti urbestro.
6. Kien nur la okulo povis atingi, lanterno **fl _ gr _ _** apud lanterno, kaj multaj el la venintoj tute ne havis lumon.
7. La banderilisto, sukcesinte lerte enŝovi la du pikilojn sur la dorson de la taŭro, forfuĝas rekte al la ruĝa trabaĵo por sin savi de la **f _ r _ _ z _** bovo persekutanta lin.
8. Estas eble sciante, ke la luno turnas sin ĉirkaŭ la propra rotacia akso en la sama tempodaŭro (27,3 tagoj), kiun ĝi bezonas por plenumi unu **r _ v _ l _ _ _** ĉirkaŭ la tero.
9. Ĉiĉikov, haste prenis sian ĉapon kaj post la dorso de la distrikta poliestro elglitis sur la **p _ r _ n _ _ _**, enkaleŝiĝis kaj ordonis al Selifano peli la ĉevalojn plenforte.
10. La junulo havis la senton, kvazaŭ la **_ _ m _ n _** de lia tornistro lin premas, tiel ke fariĝis al li malfacile spiri; li malstreĉis ĝin, sed nenio helpis.

Ekzerco 2. Finskribu ĝustan vorton.

1. Nun do mi vendas miajn **a _ c _ _ _ _ _** je bonega prezo, kun bonega gajno; kelkajn tagojn aŭ semajnojn poste la ordinaraj akciuloj suferos teruran perdon pro falinta kurzo.
2. Vizitu riveron, sed protektu vin kontraŭ moskitoj, ili portas danĝerajn malsanojn; oni diras, ke manĝado de **a _ l _** bone protektas – certe ĝi efikas kontraŭ geamikoj.
3. La pluvo gluis la **b _ kl _ _ _ _** de liaj longaj haroj en ŝnurojn.
4. Aviadilo fuŝiĝis en la aero, la **p _ l _ t _ _ _** provis ĉion por savi ĝin, sed senefike.
5. Kelkaj birdoj, kaj precipe **p _ p _ g _ _ _** sukcesas prononci vortojn kaj perparole interagadi kelkfoje kun homo.

6. En gratenaĵoj, supoj, **t _ rt _ _** kaj kukoj la partoprenantoj de la esperantista *kuirada semajnfino* malkovris tradiciajn aŭ originalajn manierojn manĝi kukurbon.
7. Okazis sep prelegoj, el kiuj unu en la angla: Fu Kin-hung el Hongkong **l _ k _ _ _ _** pri la emociaj faktoroj influantaj la lernadon de Putonghua kiel duan lingvon.
8. La homoj ĝuas **r _ l _ t _ v _ _** prosperon sub Putin, kaj ili ankoraŭ gardas malagrablajn memorojn pri la krima ĥaoso, kiu antaŭis lin.
9. La grandaj energikonzernoj volas plu dependigi la homojn kaj **d _ k _ _** la ĉiam kreskantajn prezojn por fosilia energio.
10. Kapreoloj volonte manĝas la bongustajn **b _ rĝ _ _ _ _ _** de fraksenoj.

Ekzerco 3. Kreu el la radikoj ĝustan vorton kaj enskribu ĝin.

azi', grinc', inspir', majest', persist', spit', pi', provok', universal', zum'.

1. Ni posttrinkis diafanan varman mielon per akvo el fonto kaj ekdormis akompanate de monotona **_ _ m _ d _** de abeloj kaj babilema balbutado de folioj.
2. El la vidpunkto kaj sperto de **_ z _ _ n _ _** naciismo kaj patriotismo, ambaŭ precipe modernaj nocioj, estas nedistingeblaj.
3. Aftoza febro respektas nek desinfektaĵojn, nek politikistojn, ĝi atakas – tion tro malfrue konstatis Blair – gerile, **_ p _ _ _ n _ _** la rimedojn de alte evoluinta, alte ekipita ŝtato.
4. Mi esperas, ke via energio kaj **_ _ _ _ _ s _ _ c _** baldaŭ akiros por via gazeto konfidon kaj estimon de la tuta esperantistaro.
5. En la akceptejo regis maldiketa brunulo, kies manieroj ŝajnis al mi iel bizare similaj al tiuj de ĉefkelnero kaj provoso: li estis tre, tro agema kaj **_ _ _ v _ _ _ m _**.
6. Oni daŭre aŭskultas ne nur muzikon de Baĥo, sed ankaŭ verkojn dediĉitajn al li kaj **_ _ _ _ _ r _ t _ _ _** de lia muzika potenco kaj de lia nomo.
7. En diversaj domoj de la urbo sonis harpoj kaj flutoj, kantoj, ridoj, frapado de marteloj, **_ _ _ _ c _ d _** de segiloj, iafoje krioj de ebruloj aŭ vokoj pri helpo.
8. Apud la templo de Izido oni mortigis kelke da **_ i _ l _ _**, kiuj antaŭdiris malfeliĉojn por Egipto, aŭ mirakle retrovis la sanon.
9. Roerich vojaĝis laŭ la antikvaj rusaj urboj – rezulte aperis la serio el 90 pentraĵoj, kie estis montritaj la beleco kaj **_ _ j _ _ _ _ c _** de la antikva rusa kulturo.
10. Zamenhof kaj Lanti transdonas ideojn pri **_ _ _ _ _ r _ _ _ _ c _**, sennacieco, tutmondeco, kion bone reprezentas la koncepto pri tutmonda, universala komunikilo, t.e. Esperanto.

Ekzerco 4. Marku taŭgan vorton:

1. Kun multe pli granda krim-energio agas estroj de ____: ili falsas bilancojn tiel, ke la akcia kurzo saltas supren; la salajro de l' estro estas ligita al la kurzo kaj li gajnas bonege.
a. kompanioj **b.** liceoj **c.** muzeloj **d.** obstakloj
2. Estos atribuitaj po tri premioj en ĉiu laŭaĝa ____.
a. gobio **b.** ciro **c.** kategorio **d.** paralelo
3. En Raŭmo, 1980, 106 ____ kaj kolektivoj lanĉis proponon de nova strategio kiu anticipis la tempojn je tuta jardeko.
a. pasaĝeroj **b.** gramatikoj **c.** nuksoj **d.** individuoj
4. La fiŝkaptistoj ne rimarkas, ke ilia parto de la glacio fariĝas flosa, kiu portas ilin al danĝero kaj ne plu eblas surbordiĝi – ili bezonas rapidan helpon de ____ aŭ de boato.
a. helikoptero **b.** volumeno **c.** universitato **d.** regimento
5. Sur naciaj vojoj, banditoj atakas aŭtojn, tamen plej suferas kamparanoj pro atakoj faritaj de bovŝtelistoj, dum ____ kaj policistoj postulas ŝmirmonon de homoj kontrolataj.
a. paraŝutoj **b.** ĝendarmoj **c.** ranoj **d.** vulkanoj
6. Ĝis la pasinta jaro, oni ____ regule unu pakaĵon monate entenantan dek librojn, ekde 2004, ni intensigis la kampanjon kaj regule sendas du pakaĵojn monate.
a. vomis **b.** ekspluatis **c.** ofendis **d.** ekspedis
7. Sed estas konate, ke, se la mortintoj ricevis malpli ol 50 mSv/jaro da radioj dum ili vivis, ne eblas ____ la kialon de ilia morto, ĉu pro radioj aŭ pro alia kaŭzo.
a. determini **b.** redukti **c.** zumi **d.** kombini
8. Unue en la banejon eniris Milena, kaj dum la akvo el la duŝo ____, Viktor sidis ĉe la eta tablo sur la teraso, trinkis kafon kaj fumis.
a. injektis **b.** bonvolis **c.** susuris **d.** akcentis
9. La kulpo de la “atomvilaĝo” konsistis en tio, ke oni kaŝadis informojn pri akcidentoj kaj paneoj en atomcentraloj, ____ datumojn kaj ignoris avertojn pri danĝeroj de tertremoj.
a. fastis **b.** manipulis **c.** buĉis **d.** koliziis
10. Pro sanproblemoj de la redaktoro de *Esperantisto Slovaka* kun sekva ____ de la aperritmo kaj malkresko de la abonantoj estas finita la eldonado.
a. buĝeto **b.** epidemio **c.** paneo **d.** ajlo